

## Babilado kun niaj aŭskultantoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-817/280, 1979 junio 07 kaj 09

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-41/SRI-1979-41-A-1-280-817-1979-06-07-09-Claude-kaj-Andree-Gacond-Babilado-kun-niaj-auskultantoj.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Nia leterujo plenas. Alvenis do la momento ekbabili kun niaj aŭskultantoj, respondante perradie al iliaj mesaĝoj. Ĉijare gvidos nin simple la alfabeto de la familiaj nomoj.

Ni salutas s-ron Lennart Aberg en Gotenburgo (Svedio), kiu estas kun sia edzino regula aŭskultanto de niaj radioprelegoj kaj de tiuj de nia kolego d-ro Baur.

A.- El Nice, Francio, s-ro H. Benda sendis al ni korusajn muzikaĵojn. Ni dankas lin.

Cl.- S-ro Franco Bianchi en Coredo, Italio ŝatus scii, kie li povas peti turistajn prospektojn en esperanto de svisaj urboj kaj vilaĝoj. Nuntempe la urboj Lucerno, kie okazos la Universala Kongreso, Locarno, kie okazos ILEI-konferenco, Romanshorn posedas esperanto-prospektojn. Oni petu ilin rekte al ilia turisma oficejo. La urbo La Chaux-de-Fonds en sia Memento regule salutas la gastojn ne nur en la germana, franca kaj angla, sed ankaŭ en esperanto.

A.- S-ro Jozef Pawel Bielinski en Bydgoszcz, Pollando, informis nin pri la esperanto-aktiveco en lia urbo, kie en 1977 disvolviĝis 24 esperanto-kursoj kaj 32 aliaj okazoj de instruado. Tiel 500 personoj esperantiĝis. Modela dinamismo, ĉu ne!

Cl.- S-ro André Blondeau en Loctudv (Francio) skribis, ĉar li ne plu sukcesas ricevi niajn elsendojn en esperanto malgraŭ multaj provoj, kvankam lia nova anteno 15-metra bone kaptas niajn franclingvajn programojn. Ni esperas, ke nia nova radio-informilo, kiun li tutcerte ricevis, alportis pli precizajn sciigojn pri la horaro de la esperanto-elsendoj. Ni profitas diri, al ĉiuj, kiuj ne ricevis tiun ĉi novan prospekton en esperanto de Svisa Radio Internacia, ke ili skribe petu ĝin al Svisa Radio Internacia, Esperanto-Fako, 3000 Berno 15, Svislando. Ni ankaŭ atentigas niajn aŭskultantojn, ke Svislando ne konas someran plifruigitan horaron. Multaj francoj, italoj kaj alilandanoj, kiam ili revenas al la vintra horaro, ne konscias, ke en aliaj landoj tia horar-ŝanĝo ne okazas. Kaj tial ili forgesas korekti siajn aŭskultajn tempojn. Eble io simila okazis al s-ro Blondeau, kiu afable aldonis al sia letero la valoregan fervojan leksikonon, kiun li ĵus finverkis. Eldonis tiun ĉi 165-paĝan libron Unio Arta kaj Intelekta de la Francaj Fervojistoj kaj Franca Fervojista Esperanto-Asocio.

A.- La antaŭparolo de tiu Fervoja Leksikono franca-esperanto kun indekso donanta interalie la liston de organizoj kaj dokumentoj internaciaj atentigas nin ke la sviso Jean Bipp reviziis la tradukojn de André Blondeaux. Depost la publikigo, en 1955, fare de Franca Fervojista Esperanto-Asocio de la Fervoj-teknika Leksikono franca-esperanta, la fervojistoj esperantistaj ne ĉesis sian internacian kunlaboron, en la celo foje povi eldoni pli modernan leksikonon. En 1973 komenciĝis la esperantigo de la franclingva vortaro Lexique général, aldonante eĉ al ĝi terminojn pli modernajn el aliaj teknikaj fontoj. Nun la esperantistaj fervojistoj, dank al la laborego de s-ro André Blondeaux kaj de liaj kunlaborintoj, povas fieri pri la rezulto.

Cl.- Saĝe, en oftaj okazoj, aperas pluraj tradukoj por la sama termino. Unue, ĉar, sen kunteksto, la franca termino povas havi plurajn signifojn; due, ĉar en esperanto povas ekzisti pluraj esprim-manieroj por unu termino. Aperas entute kvindeko da neologismoj, sed ĝenerale nur kiel dua aŭ eĉ tria traduko, kies duono jam aperis en aliaj vortlistoj. Mi atentigas, ke ankaŭ la franclingva parto registras neologismojn el la periodaĵo "Journal Officiel de la Republique Française".

A.- Ni konstatas oportunan rezignon pri tro longaj kunmetitaj vortoj, kaj la uzon de ligo-streketo en la kunmetaĵoj, kio faciligas la komprenon fare de nefakuloj.

Cl.- Por tiuj, kiuj ŝatas statistikon, ni ankoraŭ menciui, ke tiu ĉi fervoja leksikono registras ĉirkaŭ 5200 terminojn. Inter ĉilastaj troviĝas diversaj listoj ne nur utilaj al fervojistoj: arbustoj, lignoj, konstruelementoj, gasoj, metaloj, kemiaĵoj, aŭtovojoj, sintezaj tekstilaĵoj, mezurunitoj kaj eĉ ventoj. Tio ĉi kuraĝigu nefervojistojn ankaŭ akiri tiun ĉi leksikonon.

A.- S-ro Maurice Bordessoulle en Etaples, Francio, multe dankas nin pro niaj interesaj paroladoj.

Cl.- S-ro Michel Bouchez en Fouquières-les-Lens, Francio, plurfoje sendis ricevado-raportojn, kiuj estas al ni utilaj, por ricevi ideon pri la aŭdeblo de niaj elsendoj. En komentaria noto li aldonis: "mi ŝatas viajn elsendojn, ĉar vi ne mokas nin per neobjektivaj propagandaj rakontoj, sed kulture kaj diverse parolas nin." Ni dankas pro tiuj kuraĝigaj vortoj.

A.- Gesinjoroj R. kaj Madeleine Bouchon en Paris, Francio kaj s-ro Camille Bournal en Terrats, Francio ricevu niajn salutojn. Tiu lasta informiĝas pri netrokosta loĝejo en Lucerno okaze de la Universala Kongreso. Plej saĝe estas peti tiun ĉi informon rekte al la kongresa komitato.

Cl.- S-ro J. Brownlee en Upminster, Britio, interalie informas nin, ke li daŭre aŭskultas nin, eĉ la saman programon trifoje. Por li la parolado pri la verkisto Sándor Szatmári estis tre interesa.

A.- El Centre culturel espérantiste en Perpignan, Francio, ni regule ricevas agadraportojn, kiujn skribas por ni A. Vidal kaj René Llech-Walter. Unu el tiuj mesaĝoj ekzemple rakontas pri internacia seminario socilingvistika okazinta ĉe la Universitata Centro en Perpignan. Ĝin partoprenis 80 fakuloj el 12 landoj. S-ro René Llech-Walter, kiu devis paroli pri la kataluna lingvo, sin prezentis ne nur kiel parolanto de la kataluna, sed ankaŭ de esperanto. Profesoroj el la universitatoj de Tananarive kaj Budapeŝto, post tiu ĉi interveno, esprimis sian intereson por la internacia lingvo.

Cl.- Ni salutas s-ron Dominique Chanel en L'Arbresle, Francio kaj s-ron Alain Chalm en Le Havre, Francio. Tiu lasta regule surbendigas niajn elsendojn por ilin aŭskultigi al siaj kursanoj.

A.- S-ino Bereugère Cheverry en Angers, Francio en ricev-raporto mencias la temon leterkesto inter la ŝatataj. Tial ŝi tre verŝajne ŝatis nian hodiaŭan babiladon, kiun ni daŭrigos la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*